



PILO-PRESS

Internacia
Informservo

Vivo de Lanti

interesa bio-
grafio de la
unua SATANO -
aperis ĉe SAT,
Parizo

Prezo 52 FF

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 22/1976 - 31 maj 1976
Aperas ĉiusemajne

Esperanto-Ekspozicio en Schwabmünchen

Schwabmünchen (pp/ĝt) - Sekve de la Germana Esperanto-Ekspozicio Augsburg 1976 okazis Esperanto-Ekspozicio en la librejo de la lernejo de Schwabmünchen de la 17-a ĝis la 21-a de majo 1976, al kiu invitis la lernejestro, s-ro Hans Emmer, la distrikta popolaltlernejo Augsburg, la unua urbestro de Schwabmünchen, s-ro Franz Stapfer kaj Geraldo Tucker, fakestro ĉe la Germana Esperanto-Instituto kaj instruisto ĉe la lernejo.

La ekspozicion vizitis ĉ. 200 personoj, inter ili proksimume 75 gelnantoj, 15 ĝinstruistoj, la urbestro kaj ĵurnalistino de Schwabmünchen Allgemeine, f-ino Schicht, kiu publikigis pri la ekspozicio du artikolojn.

Geraldo Tucker, la organizanto de la ekspozicio, opinias pri la ekspozicia rezulto:

Malgraŭ la relative malgranda nombro da vizitantoj - pro diversaj kaŭzoj - , eblas konstati pozitivan bilancon pri ĉi tiu miniatura eldono de la Germana Esperanto-Ekspozicio.

- a) Ebligis per ĝi kontakto kun la urbaj instancoj de tiu urbeto. Principe la urbo Schwabmünchen estas preta inviti esperantistan arangon, ekz. Bavaran Esperanto-Tagon, kun urbestraj protekto kaj akcepte; ankaŭ kun denova, pli granda ekspozicio.
- b) Tio estis la unua provo de ekspozicio en la urba biblioteko kaj la urbestro estas konvinkita, ke per taŭga varbado estontaj ekspozicioj povas fariĝi bona tradicio en Schwabmünchen. La urbo evidente rigardas la Esperanto-ekspozicion kiel sukcesan eksperimenton.

Unu instruisto sekve de la ekspozicio mendis Esperanto-lernolibron, kaj urbestro Stapfer nepre subtenas la oferton de Esperanto-kurso en Volksbildungswerk Schwabmünchen.

Pentekosta renkontiĝo de GEJ

Darmstadt (pp) - En la junulargastejo Weinheim/Bergstr. okazos dum pentekosto renkontiĝo de Germana Esperanto-Junularo (GEJ). Krom referaĵo kaj diskutgrupo gvidata de Claude Nourmont pri ĝeneralaj aspektoj de E-laboro estas antaŭvidataj pluraj kunsidoj pri diversaj specifaj kampoj de GEJ-laboro.

Jen kelkaj temoj: "Publika laboro, varbado" (Ulli Brandenburg, Karl Trimborn); "Financaj aspektoj kaj praktikaj ekzercoj" (Hans-Dieter Platz); "Bazaĵ postuloj de junulara renkontiĝo" (Klaus Schubert); "Loka kaj grupa laboro" (Franz Kruse); "Junularinterŝanĝo" (Christof Roether); "Koresponda Servo de GEJ" (Benno Klehr).

D-ro Kondor en Nürnberg

Nürnberg (pp) - D-ro Josef Kondor, konata esperantisto kaj iniciatinto de la ĝlumarkoj favore al lepruloj, dum kelkaj horoj restadis kun gimnaziaĵ lernantoj en Nürnberg, sabate la 29.5.76. Ludwig Pickel gvidis la gastojn tra Nürnberg kaj fine de la vizito transdonis al la lernantoj Esperanto-varbilojn.

Universitata Esperanto-grupo aktivas

Münster (pp) - Dum la somera semestro la Universitata Esperanto-grupo de Münster pliaktivigis. La unuan fojon aperis en la programo de la internacia centro de la universitato krom aranĝoj de la angla, franca kaj hispanamerika rondo ankaŭ propraj de la Esperanta.

Okazas prelegoj precipe de eksterlandanaj esperantistoj, kiuj studas en Münster aŭ estis invitataj. La 21-an de majo referis Jim Cushing (Usono), kiu ĉi-tempe laboras en Paderborn, pri "Samrajtiganta memhelpado de meksikdevenaj farmlaboristoj en Usono". Poste intervjuis lin loka gazeto "Münstersche Zeitung" kaj aperigis tre favoran artikolon kun bildo. La eĥo en la universitato estas jam tiel intensa, ke oni devis organizi neplanitan porkomencantan kurson.

Tial la grupo jam petas nun eksterlandanajn esperantistojn, vizi ti Münster, eble per la Pasporta Servo de TEJO, kaj subteni la venontan programon de la vintra semestro. Skribu al Rudolf Fischer, Hüfferstr. 75, D-4400 Münster.

Kunlaboro inter esperantistoj kaj etnismaj movadoj

Stolberg (FRG) - pp - La sekretario de Asocio Internacia por la Defendo de la Minacataj Lingvoj kaj Kulturoj, Uwe Joachim Moritz, turnis sin per cirkulero al la Esperanto-organizaĵoj kaj unuopuloj kun propono pri kunlaboro. En la cirkulero oni povas legi, ke esperantistoj kaj tiuj, kiuj pledas, batalas por protekto de etnaj lingvoj, devus tre intime kunlaboradi, ĉar ambaŭ movadoj havas tre similajn aŭ eĉ identajn celojn: forigi la lingvan kaj kulturen diskriminacion inter unuopaj homoj kaj tutaj popoloj.

En la cirkulero estas starigitaj krome jenaj enketaj demandoj:

- 1) Ĉu vi jam praktikas kunlaboron kun etnaj organizaĵoj en via ŝtato? Se jes, kia estas tiu kunlaboro? Se ne, ĉu vi pretas komenci tiudirektan kunlaboron?
- 2) Kia estas via sinteno koncerne la etnajn grupojn vivantajn en la teritorio de via ŝtato?
- 3) Ĉu ekzistas publikaĵoj en Esperanto pri la diversaj etnoj?
- 4) Ĉu vi disponas informilojn pri Esperanto en tiuj diversaj lingvoj?
- 5) Ĉu vi bonvolas indiki, laŭeble bibliografie komplete, la lernolibrojn kaj vortarojn pri Esperanto en la diversaj lingvoj parolataj en via ŝtato?
- 6) Ĉu vi bonvolas sendi al mi laŭeble ampleksan materialon pri la etnaj vivantoj en via ŝtata teritorio?

Adreso: Uwe Joachim Moritz, Feldstr. 38, D-5190 Stolberg.

Tagoj de Bydgoszcz

Bydgoszcz (pp) - La Urba Oficejo, Kultura Fako, kaj Pola Esperanto-Asocio, Filio en Bydgoszcz, invitas al Internacia Esperanto-Renkoniĝo de la 4-a ĝis la 6-a de junio 1976 okaze de la Tagoj de Bydgoszcz. La programo antaŭvidas lumbildprelegon, ekskurson, teatraĵojn, koncertojn ktp. Ludos i.a. "Niaj Bardoj", "Kvarteto de Esperanto" kaj la Pola Esperanto-Teatro

Kulturaj tagoj en Wels

Wels (pp) - Okaze de la 1200a datreveno de ekzisto de la Urbo Wels (Aŭstrio) okazos en tiu urbo Esperanto-Kulturtagoj de la 24-a ĝis la 27-a de junio kun i.a. Esperanto-ekspozicio en "Arbeiterkammer".

Nia aktuala komentario

Mokinda Helvitizismo

Kien povus gvidi la "helvetizismo" de multaj eŭropemuloj montras la ekzemplo de la svisoj mem.

Laŭ radio Stuttgart (la 22-an de majo 1976): "...ĉum la germanlingvaj svisoj lernas kiel unuan fremdlingvon la francan kaj poste la anglan, la franclingvaj svisoj, eĉ la kleraj, ĝisnun komode uzadas nur la gepatran francan."

Nur nun oni komencis kursojn por la germana lingvo (pri la aliaj du oficialaj lingvoj, la itala kaj romanĉa ne estis mencio en la sendaĵo).

Tiuj ĉi faktoj prognozias la vojon de lingve helvetizita Eŭropo. Jam nun la lingve maldiligentaj francoj kaj angloj profitadas de la lingva pliklereco de la ceteraj (duaklasaj) eŭropanoj, la francoj por la sukcesigo de nacipolitikaj celoj kaj la angloj por tirigi sin el fuŝekonomia marĉo. Komprenoble, la aliaj sekvu la francajn gvidantojn kaj tiru la anglajn enkotiĝintojn.

Malgraŭ la fakto ke necesis treni la anglojn en la Eŭropan Komunaĵon, ilia lingvo havas la plej bonajn ŝancojn venki en la lingva konkurenco. Zorgis pri tio jarcentoj da maljustaĵoj kontraŭ pli malfortaj nacioj (koloniismo) kaj la relative simpla (se ankaŭ kaosa) strukturo de la lingvo en ĝiaj unuaj lernstadiaĵoj.

Tial verŝajne estonte okazos al la okcidenteŭropanoj tio, kio okazadas al usonanoj en eksterlando. Ne ĉiuj el ili ĝojas esti nomataj angloj. Kaj kiom da aŭstroj akceptas la nomon germano?

Tamen - Eŭropanoj: Preparu vin fariĝi "kontinentaj angloj"! Pri tio zorgas kultura kapitulaco de viaj registaroj. Pri tio zorgas la edukministerioj de viaj landoj kaj provincoj. Pri tio zorgas via propra subtakso de la lingva problemoj kaj via inertecon koncerne ĝian solvon.

Gerald Tucker

Esperanto en la Radio

Zagreb. Respondoj al korespondantoj kaj trarigardo de ricevitaĵaj periodaĵoj, jen la temoj de la Esperanto-elsendo el Zagreb post la kutimaj novaĵoj el Jugoslavio, vere interesa elsendo, ĉiam bone aŭdebla.

Varsovio. La Esperanto-Ekspresso informis pri la morto de fidela, multjara aŭskultanto en Latvia Soveta Respubliko, Edvard Dansig (?), kies nomo estis ofte aŭdebla en la leterkesto. - Jerzy Grum intervjuis Pavel Rosa de Slovaka Esperanto-Asocio kaj Detlev Blanke de Centra Laborrondo Esperanto en GDR. Bedaŭrinde Pavel Rosa ne estis bone komprenbla, sed li raportis pri la agado en Slovakio kaj atentigis pri la venontjaraj jubileo: 90-a datreveno de la apero de la Esperanto-lernolibro, 60-a datreveno de la morto de d-ro Zamenhof. Detlev Blanke invitis al la Unua Internacia Esperanto-Kampado en GDR komence de septembro ĉi-jare. - Per diversaj informoj kaj felietono Varsovio atentigis pri la baldaŭ okazonta vizito de Edward Gierek en FRG.

Romo. Novaĵoj el Italio: Italujo fabrikos korajn valvojn, jen la temo de la unua parto de la elsendo. La Kuriero de Esperanto i.a. gratulis al la Esperanto-Redakcio de Varsovio pro la 10mila elsendo kaj informis, ke "Bim-Bum-Bam" televida kabareda programo, envicigis la UK en Bolonjo inter la ĉefajn eventojn de la jaro 1955-a.

10-tagaĵ ekskursoj tra Pollando

valoraj objektaĵ premioj

atendas la eksterlandajn aŭskultantojn de la Pola Radio, kiuj respondos al jenaj demandoj:

- Kion vi scias pri la vivo, problemoj kaj rolo de la juna generacio de la nuntempa Pollando? Kiel oni aprezas en via lando la junan generacion kaj kiajn perspektivojn oni ligas kun ĝi?
- Kian signifon havas, laŭ via opinio, la internaciaj junularaj aranĝoj? Ĉu vi partoprenis en tiaj - se jes, kiajn impresojn vi elportis?
- Kiel vi aprezas la disaŭdigojn de la Pola Radio, dediĉitajn al la problemaro de la juna generacio? Je kiuj demandoj /temoj/ kaj kiel oni devus pliriĉigi tiujn ĉi dissendojn?

Respondo al unu el la supraĵ demandoj rajtigas al partopreno en lotado de la premioj.

La leterojn oni petas sendi laŭ la adreso: Polskie Radio, 00-950 Warszawa, P.O. Box 46, Pollando - en kovertoj signitaj per la devizo: "Konkurso", ĝis la 15-a de junio 1976 j. /decidas la dato de la poŝta stampo/.

La rezultojn ni anoncos en la dissendoj de la Pola Radio por Eksterlando la 30-an de junio 1976 j.

La ekskurso de la laŭreatoj de la ĉefaj premioj okazos en periodo indikota de la Pola Radio.

Ni deziras sukceson en lotado de la premioj.

Partoprenu mem la konkurson kaj partoprenigu aliajn!

Polskie Radio Warszawa

Pola Radio elsendas en Esperanto:

Je la 6,00 h sur 31 m, 49 m, 75 m, 200 m

Je la 16,30 h sur 31 m kaj 41 m

je la 22,30 h sur 49 m, 75 m, 200 m